



PILO-PRESS

Internacia

Informservo

JUNA AMIKO internacia lerneja revuo

Jus aperis

N-ro 3/75

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 514269

N-ro 30/75 12 aŭg 1975
Aperas ĉiusemajne

Leĝopropono 1667 - Enkondukaj motivoj

Paris (SAT-amikaro). En numero 25/75 de Pilo-Press ni publikigis la Esperanto-tradukon de la leĝopropono n-ro 1667 al la Nacia Asembleo de Francio favore al la fakultativa instruado de Esperanto en duagradaj lernejoj.

Hodiaŭ ni publikigas la Esperanto-tradukon de la motivoj, kiuj igis la proponantajn deputitojn prezenti la leĝoproponon.

La enkondukaj motivoj tekstas:

" Sinjorinoj, Sinjoroj,

La teknikaj progresoj sur la kampo de la transportoj kaj komunikadoj, por nur citi, ekzemple, la momentajn transsendojn tra la mondo pere de interkomunikaj satelitoj, montras tute evidente, ke la fizika proksimiĝo de la popoloj estas plenumita fakto.

La ekonomia evoluo de la mondo alcelas formadon de pli vastaj politikaj unuoj: tia estas la plivastiĝo de la eŭropa komunumo. Kaj tamen postrestas ankoraŭ manko inter la scienca disvolviĝo kun universala karaktero, kaj la lingva kaj morala apartiĝo, kiu izoligas la popolojn laŭ maniero pli rigora ol landlimo.

Se nuntempe tiu fizika, ekonomia kaj politika proksimiĝo de la popoloj trudigas, fakte ĉiun tagon pli, ĝi ne malpli kolizias kun la diverseco de la lingvoj, kaj reliefigas la sentese kreskantan bezonon pri komuna lingvo de komunikado.

Cele alporti rimedon al tiu situacio, oni povis rekomendi, pro kialoj de facileco kaj ekonomio, tuj plivastigi la uzon de unu ĉefa laborlingvo. Sed la elekto de tiu lingvo, kiu devas havigi al si la akcepton de ĉiuj ŝtatoj kaj konformiĝi al la esenca bezono de parola komunikado, rekta kaj spontana inter homoj de ĉiuj sociaj situacioj, estigas multajn malfacilojn.

La unua solvo, kiu venas en la spirito, konsistas en tio revivigi iun mortan lingvon, kiel la latinan. Sed tiu hipotezo neniel rezistas al ekzameno: tia lingvo, jam forlasita de la Eklezio, estas neadaptita al la bezonoj de la moderna vivo, ĝi malkuraĝigus ĉiujn homojn pro siaj gramatikaj malfaciloj.

La dua solvo direktus la elekton al nacia lingvo de granda disvastiĝo. Sed tio kondukus devige al diskriminacio des pli timinda, ke la lando kies lingvo estas elektita neeviteble plivastigus sian superecon, tiom kultural, kiom ekonomian, super la aliaj nacioj.

Ne estas racie kredi, ke la popoloj akceptos vidi sian kulturalan heredaĵon danĝere minacata, kaj eble iam forpuŝita.

La tria konsistus el dulingvismo de naciaj lingvoj, kia la dulingvismo franca-angla. Sed, en reale, tiu paliativo sugestita pro esceptaj cirkonstancoj de la fino de la lasta milito, supozigas trilingvismon: kiel, fakte, germano lerninta la anglan komprenus italon uzanta la francan? Tiu speco de dulingvismo kondukus

do al nova diskriminacio, kiu estigus por aliaj popoloj, do por la plimulto de la homoj, la neceson lerni du fremdajn lingvojn. Kaj oni ne vidas kial aliaj popoloj ne serĉus trudi aliajn "du-lingvismojn": rusan kaj germanan, ĉinan kaj hindian ekzemple! Krome, tia miksidevena solvo restus probable nefirma kaj certe danĝera por la estonto de ambaŭ lingvoj, ĉar estus timinde, ke unu el ambaŭ trudanstataŭ la alian (kio rekondukus al la mal-oportunaĵoj de la dua solvo) aŭ ke ili reciproke infektigu iom post iom, diserigu kaj disigu en diversajn ĵargonojn, kiaj la "frangla" (1).

Tial la plej bona solvo estas la uzo de internacia lingvo, kiu estu tia laŭ naturo kaj destino; de lingvo facile uzebla por ĉiuj homoj kaj kiu, pro tio, estus protektata kontraŭ la influoj de la naciaj lingvoj.

Tiu solvo donas sian tutan sencon al la nura vera dulingvismo valora por ĉiuj homoj: - Nacia lingvo en la kadro de la nacia komunumo; - Internacia lingvo por la internaciaj rilatoj.

Memkompreneble, tia komunikad-rimedo evitus al ĉiuj homoj, kiaj ajn estas iliaj socia rango, intelekta nivelo, ideologio kaj deveno, la netolereblan ridindecon ne povi esprimi sin libere ekster siaj lingvaj limoj; ĝi estus faktoro de netaksebla progreso sur la kampo de la ekonomiaj, teknikaj, sciencaj, turismaj inter-ŝanĝoj, kaj por la kultura pliriĉigo de la homoj.

Tiu solvo, dank' al kiu neniu homo troviĝus en situacio de mal-supereco antaŭ fremdulo de kiu ajn lando ĝi estus, havas fine la avantaĝon meti finon al la lingva diskriminacio, kaj sekve al la danĝera kaj multekosta konkurado, kiu rezultas el ĝi.

La ĝenerala konferenco de UNESKO agnoskis, ke la rezultoj atingitaj pere de Esperanto en la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la alproksimiĝo de la popoloj kongruas kun la idealoj de UNESKO; tio montras kiom ili kontribuas al la internacia kooperado sur la terenoj de la edukado, de la scienco kaj de la kulturo.

Esperanto prezentigas, nuntempe, post 80 jaroj de formiĝado, de eksperimentoj kaj tradicioj, spite du mondmilitojn, kiel la sola vivanta lingvo, fundamente internacia, kiu estas facila kaj atingebla por ĉiuj, logika kaj klara, perfekte disponebla por la esprimo de kulturaj valoroj de internacia grado.

Ĝia enkonduko en la publika instruado fariĝis objekto de multaj deziresprimoj flanke de membroj de la Instituto de Francio, de sciencistoj kaj de lingvistoj, de politikistoj kaj de instruistoj de preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.

La progresiva organizo de ĝia instruado nun dependas nur de politika decido: al vi apartenas, Sinjorinoj kaj Sinjoroj, alpreni tiun decidon, kiu certigas samtempe la protekton kaj la radion de la diversaj kulturaj heredaĵoj de la homaro en ĝeneralaĵ komprenemo kaj kooperado de ĉiuj popoloj.

La akcepto de la internacia lingvo Esperanto, kiel fakultativa lingvo en la programoj de la duagrada instruado estas unualoke postulenda.

Tia estas la objekto de la jena leĝpropono.

- (1) Noto de la tradukinto: "Frangla" - rezulto de la influo de la angla lingvo rilate al la franca ("franglais")
français = franca ; anglais = angla

Gvidrezolucio de SAT-kongreso

Hago (SAT) Dum la SAT-kongreso en Haga estis akceptita jena gvidrezolucio:

"La 48-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda okazinta en Haga, Nederlando, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1975, kiu kunigis 300 partoprenantojn el 19 landoj, post diskuto kaj aprobo de la Raportoj

- konstatas, ke multaj el la membroj klopodis akiri influon ĉe diversaj laborist-tendencaj organizoj, speciale sindikataj;
- petas, ke la Plenum-Komitato kaj la Laboristaj Esperantaj Asocioj ellaboru agad-planojn, kiuj ebligas pli intensan kaj pli efikan laboron;
- ĝojas, ke la multjara milito en Hindoĉinio finiĝis kaj en tiu konekto vokas la loĝantaron en la tuta mondo kontraŭstari la daŭran pacminacantan armadon;
- sendas mesaĝon al la registaraj reprezentantoj de la Konferenco de Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, en Helsinko;
- registras la pozitivajn paŝojn por akceptigi Esperanton ĉe la Socialista Internacio;
- fidas, ke la membraro, malgraŭ la malfacila ekonomia situacio en la tuta mondo, ankaŭ estonte morale kaj finance subtenos la asocion."

Liberala lingvopolitiko por Eŭropo

Paderborn (hb) En la kadro de la okcidentgermana Liberala Partio F.D.P. fondiĝis laborgrupo "ALEUS" por ellabori la bazajn ideojn de liberala lingvopolitiko por Eŭropo. Ĝis nun jam ekzistas laborgrupo (ĉ. 30 presitaj paĝoj) kun la argumentoj por

- 1) samrajteco de ĉiuj sep lingvogrupoj en la estonta Eŭropa Federacio (anstataŭ privilegiigo de la franca kaj la angla);
- 2) libereco de la elektado de fremdlingva instruado en la lernejoj (anstataŭ monopolo de praktike unu lingvo).

La laborgrupo proponas la rezolucion en la venonta jaro al la oficiala kongreso de F.D.P. Antaŭe ĝi serĉas kunordigon kun lingvopolitikaj specialistoj en la aliaj liberalaj partioj en Eŭropo.

Mi proponas ke oni demandu oficiale flanke de la estraro de nia partio aŭ de lingvopolitika spertulo de nia partio la labortekston de ALEUS p.a. Prof. D-ro H. Frank, D-479 Paderborn, Brockhoefe 2

SPD por lingvokonferenco en Romo 1976

Hamburg (pp). S-ino Elsbeth Bormann, estraranino por informado de GEA informas:

Post pli ol unujara intertraktado kun la centraj instancoj de la estraro de Socialdemokrata Partio de Germanio (SPD) en Bonn, Holger Börner, la federacia afergvidanto de la partio, per letero de la 7-a de aŭgusto 1975 informis GEA-on, ke la partio delegos unu observanton ĉeesti la konferencon de socialistaj esperantistoj en Romo 1976, nome de SPD. Por tiu persono ĉio estos pagita de la partio.

La alvoko de la itala socialdemokrata partio PSDI, kiu planas por septembro 1976 konferencon pri la solvo de la lingva problemo kun aliaj socialdemokrataj partioj en Romo, per tio estas sekvata post la dana nun de dua partio.

SPD por.....(daŭrigo)

La aliajn membrojn de la germana delegacio konsistigu esperantistoj samtempe membroj de SPD, kiuj sen oficiala apogo veturu al Romo. Se ni esperantistoj pretas al tio - kaj ni certe kontribuos, ke la intenco de PSDI sukcesu - , la germana SPD oficiale informos PSDI pri sia preteco kunagi.

Germanaj esperantistoj, kiuj plenumas respektive akceptas la kondiĉojn, anoncu sin ĉe S-ino Elsbeth Bormann, 205 Hamburg 80, Schärstr. 26

ZDF:"U E A disfalas"

Saarbrücken (pp) La Dua Germana Televido (ZDF) kadre de "Notoj el la Federaciaj Landoj" (Drehscheibe) merkrede, la 13 aŭg. mallonge raportis, ke en Saarbrücken okazas internacia Esperanto-konferenco, kiun partoprenas ĉ. 100 personoj. Plue oni informis, ke laŭ prezentita dokumentado pri la strukturo de la Esperanto-movado sin montras, ke Universala Esperanto-Asocio disfalas en du blokojn, en okcidentan kaj orientan.

Podia diskutado en Saarbrücken

Saarbrücken (pp) Laŭ informo de Sarlanda Esperanto-Ligo okazos kadre de la internacia konferenco de la 10 - 17 aŭg 1975 sub la honora protektado de la prezidanto de la Universitato de la Sarlando, Jaŭde, la 14 aŭg 1975, je la 14,30 horo en la filozofia fakultato de la universitato podia diskuto pri la temo "La lingvoproblemo en la internaciaj rilatoj kaj la taskoj de la neŭtrala Esperanto-movado".

Por la diskutado deklaris sin pretaj:

Prof. D-ro Wilss, Interpretista Instituto

Prof. D-ro Helfers, Sociologia Instituto

OSTR. Block, prezidanto de Kulturpolitika Komisiono de F.D.P. de Sarlando

Sinjoro Springer (SPD), membro de la landa parlamento

Prof. D-ro Lapenna, London School of Economics

Diskutgvidanto estos Dipl.mat. Maas, universitato de Sarlando.

Hamburgo en Retrospektive

La supre citita "Dokumentado", pri kiu raportis ZDF, nomiĝas "Hamburgo en Retrospektive Dokumentoj kaj materialoj pri la kontraŭneŭtraleca politika konspiro en UEA". Aŭtoro estas Prof. d-ro Ivo Lapenna, eldonis ĝin Sarlanda Esperanto-Ligo. Formato 20,5 x 29,2 cm, broŝ. , 96 p., prezo 9,- GM.

El tiu "Dokumentado" ni eksciis, ke ankaŭ Pilo-Press kaj ĝia eldonanto apartenas al la "konspirantoj". Tio vere estas granda novaĵo, kiun la aŭtoro volas pruvi per 4 citaĵoj. Se ĉiuj aliaj "dokumentoj" baziĝas je sama fidiindeco, tiam oni povas nomi la tutan "dokumentadon" fantaziaĵo.

Esperanto en Radio

Varsovie en sia pasinta Esperanto-Ekspresso disaŭdigis denove sonraportojn pri la kongresa inaŭguro en Kopenhago. Vere impona estis la nombro de reprezentitaj diplomaĵoj, kiuj parte parolis en Esperanto.

Vieno i.a. disaŭdigis intervjuon Eriko Sunardo, Unua Sekretario de la Indonezia Ambasado en Vieno, kiu jam de 25 jaroj parolas Esperanton.